

La dinamismo kaj kresko de la tero pro sia transformebla kerno de la nukleo

Geoteorio de la materio en transformado

VEDAT SHEHU *

En tiu ĉi artikolo prezentiĝas teorio de la Tero generanta energion, kreskanta kaj evoluanta, ekde la origino, pro la superdensa transformebla kerno de la nukleo. Per tiu teorio unueciĝas la divergaj direktoj de la hipotezoj moveblismaj de la tutmonda tektoniko. Des pli ĉi tiu transformado estas procezo nuklosinteza; la elementaj kaj superelementaj partikloj liberigitaj de la superdensa stato, formas plasmon, radiadon kaj rekonstruktigas je formo atomo-molekuleca de la materio. Certa maso de la partikloj, liberigita kaj rekonstruita je formo atomo-molekuleca okupas volumon multoble pli kaj kaŭzas la kreskon de la Tero de interne. Sekve, pruveblas, ke la nukleo ne estas inerta maso je fero kaj nikelo "falinta en la fundo", sed kosma dinamika objekto lokita kiel energitika centro de la Tero ekde la procezo de la formiĝo de la planeda sistemo. Ĉi tie en la artikolo estas integritaj dhe eksplikitaj resume la premisoj de mia teorio publikigita kiel libron kaj artikolojn.

1 Enkonduko

Tio, kio allogis kaj orientigis min por esplori la problemojn de la tutmonda tektoniko, estis la scivolemo por pli bone kompreni la originon de la magmaj rokoj formintaj kaj konsistigintaj la ofiolitikan zonan (La areon Mirdita) de Albanidoj (de la albanaj teritorioj). Mi ne konsideris argumentita la hipotezon, ke la lafo de la vulkanoj formiĝis, kiel supozite laŭ la establitaj teorioj pri la origino de la Tero. Tiu ideo instigis min rigardi la nukleon de la Tero el la vidpunkto pri la kosmologia origino de la planedo en la sunan sistemon, kiel unu el la gravitaj nukleoj kaŭzintaj la gravitan falon de la gaso-pulvora nuboj kiu formis la sunan sistemon. Unue la donitaĵoj, la faktoj, la atesoj, kiuj estas bazo de la moveblismaj interpretaĵoj de la tektoniko de la platoj, nature funkcias kiel premisoj de la ekspansio, kio estas la sola alternativo moveblisma. Due pro la manko de la ĉeesto de la radioaktivaj izotopoj kiel energi-generantoj falas la hipotezo, ke la mantelo estas ja la fonto de la dinamismo de la Tero. Trie la tektonikaj platoj ne rilatas al la tektoniko de la platoj sed estas realo de la tektonikaj tutmondaj blokoj kiujn oni nomis ankaŭ "tektonikaj grundbuloj" (angle slabs). Kvare estas pruvite ke ĉi tiuj platoj aŭ grundbuloj nur foriĝas disde ĉiuj tutmondaj fendoj mezocanaj, kie

* vedshehu@yahoo.com

generiĝas la oceana krusto, dum la hipotezo, ke ĉi tiuj proksimiĝas kaj kvazaŭ subme-
tiĝas al la kunfrapiĝo, droniĝo kaj cirkulado per *degeliĝo-frostiĝo* ne pruviĝas. Kvine
ĉar la ideo degeliĝofrostiĝo, cirkulado de la litosfero ne praviĝas kiel meĥanismo de
la tektoniko de la platoj, restas ke ambaŭ alternativoj unueciĝu sub unu integra titolo
“La tektonikaj platoj de la kreskanta Tero”. Tiun unueciĝon atestas la realo, la kom-
prenado de la funkcio de la kerno de la nukleo kiel energia fokuso, kie transformiĝas la
materio. La kerno de la nukleo, kiel rezultiĝas ĉe mi, malintegriĝas spontane sub la
efiko de la internaj kunagadoj, eble je la ĉeesto de iu katalizanto. La argumentado de
ĉi tiu teorio finiĝis per la publikiĝo en la albano de mia libro pri la Tero kiu evoluiĝas
ekde la procezo de la kresko, je kvaronjarcenton antaŭe, poste en la angla [39] kaj en
la artikoloj [38, 37]. Ĉi tiun teorion kun la subtitolo “Geoteorio de la transformado de
la materio” mi prezentas koncize en ĉi tiu artikolo.

2 Du geotektonikaj moveblismaj alternativoj kaj la dinamismo de la Tero


Jam estas fakto, ke la kontinua kontinenteca krusto estis fendita kaj la kontinentecaj
grundbuloj estas foriĝintaj, dum inter ili estis formita progresive la oceana krusto, kiu
generiĝis kaj daŭre generiĝas laŭlonge de la akso de la mezocena tutmonda fendo
(bildo 1). Ĉi tiu fakto konfirmis la moveblismon, fondita ekde je sojlo kaj komenco de
la pasinta jarcento en la du eblaj alternativoj:

1. La kontinentoj povus foriĝi reciproke pro la plilarĝiĝo/ekspansio de la Tero
esprimita de Yarkovsky [5] kaj Montavani [32] etikedita kaj restinta kiel absurda.
2. La kontinentoj povus foriĝi per la flosado sur sia viskozplasta subtavolo en tero
je fiksa grandeco la versio de [45], flankenlasita pro manko de la aganta meĥ-
anismo. Aktuale la faktaj donitaĵoj el la kontinentoj, kompletigitaj per tiuj el la
oceanoj, pravas la moveblismon en la samaj ambaŭ alternativoj, sed je bone ko-
nata diferenco. La pli postaj suplememntaj donitaĵoj el la oceana fundo atestis,
ke la blokoj kun kontinenteca krusto foriĝas unu disde la alia, ne en si mem, sed
ĉiu aliĝinta respektive en unu grundbulo (plato) kun oceana krusto.

Ĉi tiuj gigandaj grundbuloj foriĝas ambaŭflanke disde la mezocenaj tutmondaj fen-
doj kie generiĝas nova bazalta krusto (bildo 1) kaj sisma agado (bildo 3). Ankaŭ ĉi
tiuj novaj evidentaj faktoj el la fundo de la oceanoj adaptiĝis al la Tero je fiksa radio;
rekonstruiĝis en la tektoniko de la platoj.

2.1 La alternativo de la tektoniko de la platoj

La teoria standardo rigardas ambaŭ moveblismajn alternativojn kiel problemojn mal-
vaste geologiajn. Ĉi-kadre prave la neomoveblismo de la tektoniko de la platoj konsi-
deriĝis revolucio, ĉar inspirigis la moveblisman hipotezon de la *translokiĝo de la konti-
nentoj de Wegener*. Kontraŭe la revolucio okazis pro la neatendita malkovro de la stre-
ĉiĝo de la oceana plando tra la generiĝo de la rokeca krusto laŭlonge de la fendo de la



Bildo 1: Skiza prezento de la foriĝo de la kontinentoj. A) La kontinentecaj grundobuloj (platoj) (1) iam kuntuŝitaj kaj la bazaltaj zonoj formitaj sinsekve (2-8) el la novaj alportoj, estas foriĝintaj disde la mezoceana fendo, atesto pri la kreskado de la Tero pro kaŭzo funkcia en la nukleo. B) La momento de la komenciĝo de la dispecigo de la kontinentoj kaj de la formiĝo de la krusto de Atlantiko, certe en globo je pli malgranda radio.

mezoceanaj krestoj, de kie, foriĝante ambaŭflanke, tio fariĝas progresive pli malnova je la direkto de la kontinentaj lipoj (bildo 1).

La fondintoj de la *tektoniko de la platoj* ([16, 20, 26]) estis devigitaj konformi al la standarda hipotezo de la fiksita tero je fiksa radiuso, tial ili supozis troigitan procezon de la drono aŭ subdukcio, inflamo de la terca krusto de la mantelo kaj cirkulado je la sama maso per kiu ĝi pliiĝas kaj grandiĝas kiel oceana krusto. Ĉi tiu interpretaĵo pravigis supozante, ke la platoj foriĝantaj disde la tutmonda fendo de unu oceano proksimiĝas kaj kunfrapiĝas kun la platoj foriĝantaj disde ambaŭ flankoj de la mezoceana fendo de la alia oceano, trans la limigantaj kontinentoj. En la loko de la kunfrapiĝo oni supozas la dronon kaj la inflamanta cirkulado. Oni klopodas la malfacilaĵojn de ĉi tiu ekspliko transpasi pere de la trombaj trajtoj de la moviĝo de la varmega maso el la nukleo tra la mantelo ĝis la enverŝoj de la vulkanaj lafoj surface [31]. Ĉar tia cirkulado estas malmulte probabla aŭ malprobabla por okazi [42], tiam per la donitaĵoj enkondukitaj en la tektonikon de la platoj necesus, ke la nocio "*streĉiĝo de la oceana plando*" anstataŭiĝu per la nocio "*pligrandiĝo aŭ kresko de la oceana krusto*" kaj la *novmoveblismo* estu orientigita je "*pligrandiĝo aŭ kresko de la tero*" [11]. La malkonsideranta aŭtoritato de la tektoniko de la platoj rilate la ununuran alternativon, la pligrandiĝon de la Tera radiuso, kaŭzis la revivigon de la *novfiksismo* [3, 25]. Oni klopodasm ke la trovitajn fragmentojn de la kontinenteca krusto je dekoj da kazoj ene de la oceana plando interpretiĝu kiel restaĵoj de la oceaniĝo de la kontinenteca krusto [29, 28, 46, 15]. Ĉi tiuj vere estas ja atestaĵoj de la eskpansiisma moveblismo, sekvaĵo de la radiusa kresko kaj multflanka de la oceana krusto kaj de la tuta globo. Kiel la disciploj de novfiksismo tiel tiuj de la tektoniko de la platoj havas ion komunan: la supozon pri la forgluto de

la kontinenteca krusto fare de la mantelo, sed, se ili sukcesas kompreni, ke la dinamismo de la Tero generiĝas en la nukleo pro la transformiĝo de la partikla materio al la formo atomo-molekuleca, ili fariĝus subtenantoj de la grundbuloj de la “*tektoniko de la kreskanta tero*”.

2.2 La alternativo de la ekspansio

Simple la neebleco de la ĉeesto de la inventita meĥanismo por pravigi la fiksan radiuson de la Tero malfermas la vojon al la alternativo de la ekspansio. La pligrandiĝo de la radiuso de la Tero estas jam pruvita. Aparte Gicarlo Scalera, profesoro en la Instituto de Vulkanologio, Romo, per artikoloj, monografioj kaj organizado de konferencoj forme de metiejaj [32, 33, 34], alportis multe da fakta materialo kaj estas instiginte multajn esploristojn orientiĝi al la akcepto de la fakto, ke la Tero pligrandiĝas, sed nature la kaŭzo restas problemeca afero solvenda en la estonto per esplorkomunlaboroj bazitaj en la teknologio kaj metodoj plej perfektaj en la kosmosciencoj kaj geosciencoj. La atento de la dominanta plimulto de la esploristoj estas koncentrita ĉe la kosma kaŭzo, kiel spontana reflekso de la ekspansio de la universo [6, 7, 22]. En multvarieco de la versioj [17, 30, 44] la kosma kaŭzo agas ene de la Tera nukleo, kie kiel en ĉiu kosma objekto la materio de la partiklaj fluoj pleniganta la spacon senfina difinita ekde antikveco kiel etero (Heraclius 535–475), aŭ la materio je formo de elektromagnetaj gravitaj fluoj [14] transformiĝas en ordinara materio kreskiganta la Teron. La simileco supozeblas ĉar la Tero, samkiel la planedoj kaj kosmaj objektoj, kreskas ĉar en sia centro la antaŭmateria spaco transformiĝas al materio kiu kreskigas la Teron. La Tero pligrandiĝas pro la *gravito de la pulvoro de la kosma peceteca materialo ekde la origino* [40] sed ankaŭ pro la absorbiĝo de la etera fluo de la nukleo [27].

La ekspansio aŭ la plilarĝiĝo de la Tero por la dominata plimulto de ĉi tiuj interpretaĵoj konsideriĝas senĉesa fenomeno. La Tero plilarĝiĝante fariĝas giganta gasa planedo kaj poste stelo. Nur por malplimulto de la interpretaĵoj la procezo de la kresko aŭ ekspansio agadas dum iu tempa intervalo kaj poste ĉesas agadi.

Estas evidente, ke la kaŭzo de la pligrandiĝo (plilarĝiĝo aŭ kresko) de la Tero ne konkretiĝas kiel leĝo de la fiziko por ke tio agu kiel natura kaj interna meĥanismo de la planedo. Fakte la plej konataj versioj pri la plilarĝiĝo, ekas el la ideo por harmoniigi la ekspansion de la Tero kun la hipotezo de la ekspansio de la universo kiel komenciĝo de nulo, ideo, kiu enkondukas, en la nebazitan premison de la komenciĝo fiziko-matematikajn interpretaĵojn apartenantajn al la eksplodo ene de la galaksio, difinita kiel la *evento supernova*. Kvankam per faktoj oni pruvas, ke la Tero pligrandiĝas, la manko de la kaŭzo de la ekspansio igis ĉi tiun hipotezon necerta kaj lasis la ekspansion en malatento science ne argumentita.

2.3 La dinamismo de la Tero

Ambaŭ ĉi tiuj alternativoj sendepende de ties diverĝaj direktoj kaj la strukturo de ties funkciado, eksplikas la sekvaĵojn de la dinamismo de la Tero kaj ne la kaŭzon de ĉi tiu dinamismo. Sekve la manko de meĥanismo de la plilarĝiĝo/ekspansio de la Tero


rilatas al la problemo nesolvita de la aganto, kiu la kvietan kosman nubon turnis al dinamika nebulozo de la sunsistemo. De ĉi tie estiĝas ankaŭ la problemoj, kiujn renkontas la tektoniko de la platoj kun ties imagita meĥanismo. Evidente la Tero funkcias kiel malgranda kosma generatoro, liberigas grandan kvanton de la energio esprimita per la magneta kampo, vulkanaj lafoj, tertremaj balanciĝoj kaj geotermika gradiento. Ĉi tiuj fenomenoj elfontas de la dinamismo de la Tero aganta ekde la origino je 4,5 – 4,6 miliardoj da jaroj. La standarda nuntempa teorio supozas ke la dinamismo de la Tero estas rezulto de la gravita kolapso de la gaso-pulvora nebulozo tra la nukleoj de la objektoj eble formintaj la sunsistemon. Oni kalkulis, ke tiu energio ne povus efiki kiel generatoro, tial oni pensis, ke ĝi devus kompletigi per la liberigita energio pro la malintegriĝo de la radioaktivaj izotopoj. Tiel oni akceptis, ke la Tero atingis la totalan fandiĝon de ĝia maso. La fero kaj nikelo, estante pli pezaj, fizike diferenciĝis en la refandita Tero kaj estis “falintaj” en la centron, kie ili formis neaktivan nukleon. Des pli la necesa termika energio supozita de la standardo. Ke ĝi liberiĝus pro la radioaktiva malintegriĝo en la mantelo, finfine ne konfirmiĝis. Poste ankaŭ nur la radioaktiva malintegriĝo de la termika energio en la plej bona kazo ene de la nukleo kalkuliĝas esti tre manka por konsideri kiel energian fonton. De ĉi tie oni povas konkludi, ke la energia fonto estas sekvo de la transformiĝo de la kosma materio ene de la nukleo. La kompreniĝo de la dinamismo de la Tero, kiel sekvo de la transformiĝo de la materio en iu fokuso de ties nukleo unuigas ambaŭ alternativojn kaj ebligas la klarigon de la diskutablaj problemoj rilataj al la komuna origino de la objektoj de la sunsistemo. Temas pri materio koncentrita kaj ne trorarigita.

3 La nukleo, energia fonto de la Tero

Apartenas al la aŭtoritato de la standarda teorio ne konsideri la rean formiĝon de la oceana krusto okupanta du trionojn de la Tera krusto inter la kontinentoj kiel fenomenon simple geologian sed kiel aperon de la kosmaj procezoj en la interno de iu planedo nomata Tero ĝuste en la nukleo. Tiel evidentiĝus la vero, ke la nukleo ne povas esti ia precipitaĵo inerta el la fero kaj nikelo “falinta” en la fundon kiel frakcio pli peza. Tio estas vera interpreto ŝajne neakceptebla por niaj mensoj trejnita, ke la pezaj kozo sin direktas malsupren, falas en la fundon de likvaĵa maso, kvankam ni scias ke la Tero ne havas fundon sed centron kaj anstataŭ la nocioj “malsupre- supre”, ĝi havas la nociojn “al la centro- de la centro”.

3.1 La Tera nukleo, dinamika kosma objekto

Nukso de migdalo estas natura nukleo kun ties kerno ene, dum ene en la frukto kun molaĵo kiel la persiko troviĝas la nukleo enhavanta ene de si la kernon. Ĝuste la kerno estas la esenco, semaĵo, la embrio de la kreska procezo. De ĉi tie mi formulis la esencan signifon de la mia teorio simple tiel: “Kion oni povus diri pri la nukleo de la persiko, se oni konus nur ties membranon kaj ion el la molaĵo?” Simile oni povus rezoni ankaŭ pri la nia planedo, ke “ne estas farinta la silikata maso la nukleon, sed kontraŭe, la nukleo,



Bildo 2: La sferocentra strukturo de la nukleo montras mem pri la fonto de la dinamismo de la tero, kiu esprimiĝas per la faza diferenciĝo de la geosferoj ekde la centro al la periferio, kontakte al la mantelo [difinita per standardaj literoj G, F, E, D'', D], sed ĉi tie per la konvencia signoj, respektive: interna firma nukleo (G) kaj ties centra nukleo; la intera intera geosfero aŭ tavolo (F); la ekstera fandita nukleo (E); la kerno de la nukleo neregistrita kaj ne kaptebla; la intera ekstera geosfero aŭ tavolo (D''); la rigidiga mantelo, t.e. la nuklea kovrilo (D).

pli ĝuste ties kerno, estas farinta la Teron, dinamikan Teron." Por ke ĝi kreskigu la nukleon kaj la tutan Teron, la kerno devas transformiĝi en materion atomo-molekuleca kaj materion radiantan. Ĉi tie, en la konciza bildo pri la nukleo, mi klopodos eskpliki la esencon de ĉi tiu aparta transformiĝo, esplorante la detalan strukturon de la nukleo en la bildo 2.

Per detala trarigardo de la bildo montranta ŝajne statikan strukturon oni povas ekkompreni la procezojn kaj fenomenojn nemezureblajn kaŭzantajn la dinamismon de la strukturo. Aperajo ne kaptita de la mezurado kaj parolanta pri la dinamismo de la nukleo, estas la malkovro de la geofiziko, ke la kompleta rotacio (dum 24 horoj) de la interna nukleo malmola ĉirkaŭ la akso estiĝas dum frakcioj de sekundo pli rapide ol la rotacio de la ekstera nukleo kaj la tuta globo. Post kelkaj jarcentoj la diferenco atingas unu tagon. Ĉi tiu do, estas unu el la aperaĵoj, kiun oni ne povas kapti per mezurado, sed montras la diferencigan rotacion de la interna nukleo. Dum en la skizo la energia dinamismo de la nukleo estas esprimita elmontre per la dominanta pozicio de la ekstera nukleo trohejtigita kaj elfandita, kiu estas lokiĝinta inter du malmolaj geosfe-

roj (mildigitaj sub premo) relative malvarmaj, ene de la silikata kovrilo de la mantelo kaj ekster la interna kompakta, solida nukleo. Ĉi tiu pozicio de la fandita maso montras la termikan energion generitan ie ene de si. Des pli tio plifortiĝas ankaŭ de la fakto ke la limo de la ekstera nukleo al ĉiu geosfero malmola estiĝis tra geosfera zono (tavolo) intera malvasta, konsistanta el miksitaj materialoj fanditaj kaj malmolaj. Ĉi tiuj tavoloj montras pri la ŝtupeca transpaso de la fandita materio al tiu malmola. Dum estas akceptite, ke la fandita maso de la ekstera nukleo malvarmiĝante je direkto de la centro "precipitas" kaj kreskigas la internan nukleon [43], ankoraŭ oni hezitas kompreni, ke la kresko de la interna nukleo estas procezo de la transformiĝo kaj samkiel la interna nukleo, kreskas ankaŭ la silikata envolvajo de la ekstera nukleo. Tiel, se ĉi tiu maso fandita de la ekstera nukleo, kiu malmoliĝas en ambaŭ direktoj, ne anstataŭiĝas kontinue, tiam la tuta nukleo estus malmoliĝinta delonge antaŭe post ĝia formiĝo. La fakto, ke la malmoliĝo ne okazis, montras, ke la maso malmoliĝanta denove generiĝas kun la dinamismo. Resume de unua flanko la fakto, ke ambaŭ geosferoj firmaj, inter kiuj troviĝas la ekstera nukleo, kreskas kaj aliflanke la fakto ke la interna nukleo rotacias kiel deŝirita globo disde la ekstera nukleo, rezultiĝas, ke inter la du nukloj devas troviĝi io, kaptebla kaj neregistrebla, io kiel dividanta ekrano, funkcia kiel energia fonto pro la transformiĝo de la materio. Ĉi tiu energia fonto devas konsisti el kosma superdensa materio en transmormado, formanta geosferon maldikegan, kiun ni difinias kiel la kernon de la nukleo. De ĉi tie oni povas konkludi, ke en la nukleo de la suno, povas ne esti la hidrogeno – kerno transformiĝanta kaj kaŭzinta la nuklelan sintezon de la kemiaj elementoj. Poste ŝtupŝtupe ni povas pasigi ĉi tiun problemon de la aparta al la ĝenerala, pli bone dirite, de la procezoj de la tutmonda tektoniko al la diferencigita dinamismo de la planedoj, dinamismo de la suno kaj kosma transformiĝo de la materio ĝis trans la kosma ĉielo de la granda eksplodo kaj trans la tercentrismo de la observita universo. Sed en ĉi tiuj vicoj ni haltas nur por argumenti, kial la dinamismo de la tero-planedo elfontas de ĉi tiu fokuso ene de la nukleo.

3.2 La funkciado de la kerno de la nukleo

La kerno de la nukleo estas energia fonto kaj fonto de la plasmato, kio estas la fokuso, kie transformiĝas la materio. Ĉi tiu energia fokuso estas la kerno de la nukleo lokita kiel superdensa geosfero, tro maldika inter la du nukleoj, ie ne la periferio de la ekstera nukleo ekster la intera areo al la interna nukleo (la cirklo kun interrompitaj strekoj en la bildo 2). Ĉi tiu transformiĝo estas procezo nukleosinteza, sed ne surbaze la hidrogeno kiel supozite, ke okazas en la suno kaj la steloj. Tio estas je formo de superdensigo de la elementaj kaj superelementaj partikloj, alie sed ankaŭ simile al la elementaj kaj superelementaj partikloj en la nukleoj de la atomoj aŭ en la kompaktaj kvark-neŭtronikaj steloj. La transformiĝo liberigas plasmon kaj energion de la fizikaj kampoj de la Tero. La fluoj de la radiadoj, liberigitaj el tiu ĉi fonto, samkiel el ĉiu alia fonto, tentas eliĝi ĉefe eksteren kaj nur eta fragmento pasas internen. En la direkto eksteren, la plasmato, transformita en mason atomo-molekuleca trohejtigita, kompletigas la eksteran nukleon kaj la radiado tenas la eksteran nukleon en fandita stato, poste tra la intera areo aliĝas al la mantelo kaj tra hereditaj vojoj pasas: aŭ je la trombaj formoj

kiuj translokiĝas tra la mantelo, aŭ tra la kanaloj je direkto al la tutmondaj fendoj kaj la vulkanaj fokusoĵoj respektivaj provizantaj la oceanan kruston per nova maso de la vulkana lafo (bildo 3).

La tre eta fragmento de la radiado kaj de la materio formita ree, atomo-molekuleca, kiu pasas je direkto de la interna nukleo kompletigas areon fanditan tre malvastan kiu inkluziviĝas en la ekstera nukleo, poste kompletigas la interan areon kaj aliĝas, kiel rigidita maso, al la interna nukleo. Do kreskas la silikata envlovaĵo (la mantelo kaj la litosfero), kreskas ankaŭ la interna nukleo, dum la ekstera nukleo restas en dinamika ekvilibro aŭ kreskas je nenotinda maso. Preter la malintegriĝo pro la transformado, kreskas ankaŭ la radiuso de la kerno de la nukleo paralele kun la kresko de la interna nukleo. La Tero kreskas envolvante la nukleon per silikataj tavoloj unu post la alia, la pli fruaj formas la eksterajn geosferojn kaj pli nova envolas la interan areon de la nukleo. En ĉi tiu procezo el la nukleo eliĝas kontinue nova materio kompletiganta la pligrandiĝon de ĉiuj geosferoj ĝis la oceana krusto (bildo 4).

3.3 La elkalkulo de la kerno de la nukleo

Nun estas jam konata kaj ĉiam pli akcentiĝas de diversaj aŭtoroj, la gravan rolon ludanta la ekstera nukleo por la vulkana, sisma, tektonika kaj magneta agadoj [9, 8]. Tamen ĉi tiuj interpretaĵoj konsideras la nukleon kiel fonton de la varma energio kaj supozas ke ĝi liberiĝas aŭ pro la dismetiĝo de la radioaktivaj izotopoj aŭ pro iu enigma fonto.

Serĉante la meĥanismojn de la energia fonto kaj de la kresko de la Tero, ni retaksu du kozojn: unue la densecon de la luno kaj Marso kun konsumita kerno ĉirkaŭ 4 g/cm^3 kaj due la kalkulojn de la denseco de la strukturo de la nukleo per la laŭlongaj sismaj ondoj (p-ondoj). Konforme al la standardaj kalkuloj de la dependeco de la denseco pro la rapideco de la laŭlongaj ondoj rezultiĝas, ke oni ne aplikis por la nukleo tiun dependecon. Tiel ni povas konkludi ke por la fandita stato de la ekstera nukleo oni povas oferti valoron ĉirkaŭ $4,5 - 5,0 \text{ g/cm}^3$, kontraŭ $9,2 \text{ g/cm}^3$. Ankaŭ la interna nukleo devas havi densecon je $6,1 \text{ g/cm}^3$ kontraŭ $12,2 \text{ g/cm}^3$. Per ĉi tiu reduktiĝo de la denseco oni kalkulas, ke 10 ĝis 15% de la tuta reala maso de la Tero ne estas maso atomo-molekuleca de ĉi tiuj nukleoj, sed koncentrita maso en la kerno de la superdensigita nukleo. Kiel ni konkludas, tiu "troa" maso kalkulita kiel ordinara materio atomo-molekuleca de la nukleo ne devas esti pli malgranda ol 10% de la tuta maso de la Tero kaj ĝi devas esti ĝuste la maso je formo de la materio superdensigita de la kerno de la nukleo, certe ene de la nukleo, kaŭzo de la dinamismo kaj la procezo de la kresko de la Tero.

3.4 La stato de la nukleoj en la korpoj de la sunsistemo

La akcentita diferencigo en la vulkana kaj energia agado inter la planetetoj kaj planedoj de la suno konsistas en la dimensioj de la kernoj de la respektivaj nukleoj kaj la nivelo atingita en ilia transformiĝo.

En la planedetoj de la generacio de la asteroidoj (Ceres, Vesta) la kerno de la nukleo estas tute transformita delonge. Ili restis nevivaj korpoj kun diferencigita krusto kaj estingiĝintaj vulkanoj.

En kelkaj nanaj planedoj kiel en la luno Io de Jupitero la vulkana agado estas la plej intensa en la sunsistemo. Nia luno en ĉi tiu fazo estis ĉirkaŭ 2,3 miliardoj da jaroj antaŭe. Delonge la vulkanismo en la luno estas estingiĝinta; la kerno de la nukleo devas esti svenanta esprimata per registritaj sismaj tremoj.

En la planedoj de tipo de la Tero, la vulkana agado estas estingiĝinta kaj la kerno de la nukleo aŭ estas konsumita aŭ estas svenanta. La Merkuro sin distingas inter la internaj planedoj pro la ĉeesto de la magneta kampo tre malforta kaj fandita nukleo kaj ekskluzive granda okupanta 70 % de la diametro kaj 40 % de la volumeno, sed tamen ĝi havas volumenon kiom la sepono de tiu de la Tera nukleo. Tiu granda eksplicitas pro la procezo de la transformiĝo de la nuklea kerno kaj la orbiteca pozicio de la planedo. Merkuro komence devus esti havanta orbitecan ekscentrecon rilate al la suno pli grandan ol la hodiaŭan.

Tiel sub tre potenca gravita altiro kaj tre intensa radiado, la materio atomo-molekuleca de la plej malpeza frakcio trohejtigita, ankoraŭ ne firmiĝinta, devus esti altirita de la suno. Sekve la transformita parto de la nuklea kerno devus esti eliginta kvanton da materio atomo-molekuleca forminta ankaŭ la silikatan envolvajon rimarkeblan malpezan sed forglutitan de la suno. La kerno de la nukleo de Merkuro estas ankoraŭ en la procezo de transformado kaj la liberigita energio tenas la nukleon fandita kaj la magnetan kampon minimuma.

La nukleoj de la eksteraj planedoj envolvitaj de gasoj H_2 , He, CH_4 , NH_3 , H_2O , sed kun la internaj intensaj radiadoj kaj potencaj magnetaj kampoj, elmontras ke la nuklea kerno ilia estas en la intensa transformado.

3.5 La Tera nukleo kaj la suno

Observante la eksterajn temperaturojn de la suno sekve de la procezoj oni rimarkas analogion al la dinamisma strukturo de la Tera nukleo, same sekve de la procezoj. Tiu simileco de la procezoj konfirmiĝas ankaŭ per la sismaj esploroj, kiuj estas difinintaj sen duboj, ke la sisma energio venas el la ekstera nukleo de la Tero kaj ke la agado de la nukleo kaj la tertrema fenomeno influigas de la sunaj cikloj [10]. Oni konfirmas la interferencon inter la agado de la suno kaj la sisma frapo surtere [8], kiun oni povas interpreti en la komencaj publikaĵoj. De tie oni povas konkludi, ke samkiel en la suno tiel en la nukleo de la Tero devas okazi similaj procezoj sed diferencigitaj en la nukleo de la Tero kiel en unu kosma mikroobjekto kaj en la giganta suno kiel stelo de la galaksio sed samtempe rilatiĝintaj al ties formiĝo ene de la sama kosma nebulozo.

Ĉi tiuj konkludoj permesas nin obeservante la nukleon de la Tero interpreti la sunon kaj inverse obserevante la sunon interpreti la nukleon de la Tero.

4 La Tera nukleo kaj la tutmondaj fenomenoj

Ni bone rememoru, ke la tutmondaj fenomenoj de la Tero estas studobjekto de la geologiaj sciencoj, sed la kaŭzo de la geologiaj fenomenoj, la dinamismo de la Tero, estas sekvaĵo de la kosma procezo. Post kiam ni argumentis, ke en la nukleo okazas kosma procezo de la transformado de la materio, estas necese el ĉi tiu vidpunkto taksi la esencajn geologiajn fenomenojn: rokoformadon kaj la tertremojn.

4.1 Ofiolitaj zonoj kaj la oceana krusto

Universala objekto de la studoj kaj ŝlosilo por la kompreno de la Teraj fenomenoj por geologo estas la roko kaj ĝia unuranga origino el la magmo en la respektivaj strukturoj, aparte en la ofiolitaj zonoj, unu el kiuj, la Areo Mirdita de Albanio, havas la enhavon kaj strukturan pozicion, tiun de la tipa ofiolita ĉenero Alpoj – Himalajo [41]. En multaj esplorlaboraĵoj [36, 35, 13] evidentiĝis la sama enhavo de la rokaj tipoj de la ofiolitoj de Albanidoj al la zonoj de la globo kaj la zonoj de la bazaltaj krestetoj [4]. Aliflanke la akcentita simileco de la konsisto de la bazaltaj zonoj de la mezocanaj krestoj (bildo 1) formitaj pro la foriĝo de la kontinentoj ebligas ankaŭ la formiĝon de la ofiolitoj de Albanidoj percepti pro simima procezo, pro la kresko de la Tero samkiel okazas al la tektonikaj supertranslokiĝoj en la tutmondaj oceanaj fendoj (bildo 3). Rokoj je tipo oceana formiĝas ankaŭ en la Ruĝa Maro, en la Fendo de la Orienta Afriko kaj en La Mediteranea Maro, kiel malfermo de iu beba oceano [33, 41].

4.2 La rokoformiĝo, sekvo de la kosma transformiĝo de la materio

La Tero rigardata kiel dinamika kosma objekto estas envolvita nukleo per roka sili-kata maso: la mantelo, la litosfero, la oceana krusto, la kontinenta krusto. Verŝajne la magmista agado kaj precipe tiu vulkana estas forminta la rokformigajn mineralojn de la Tero, luno, planedoj, planedetoj k.c. Sed en aliaj kondiĉoj estas formitaj la analogaj mineraloj rokformigaj de la pulvoraj partikloj kaj pecetoj de la nuboj de la kosma spaco, en la materialo forĵetita de la steloj, en la postrestaĵoj de la supernova k.a. Tiu ĉi rokformiga agado akompanatas ĉie per gasoj kaj radiado [1]. La mineraloj formantaj la rokajn partiklojn en la kosmo estas molekulaj ligoj kiel fina produkto de la nukleosintezo [21], procezo okazanta en la steloj samkiel en la suno kaj dum la eksplodo supernova. Sendepende de fakto, ke la eksplodo estas mallongdaŭra evento je kelkdekoj da sekundoj, la materio disvastigita radias intense dum multaj semajnoj kaj kvankam estas tute kontraŭaj kondiĉoj al la stelo je tipo suno, oni interpretas, ke ĉi tiu eksplodiga nukleosintezo disvolviĝas analoge kiel en la suno, sinteziĝas la nukleoj de heliumo el la unuiĝo de la nukleoj de hidrogeno kaj poste kun la nukleoj de aliaj elementoj malpezaj, por formi pli pezajn atomojn. La neŭtronikaj aŭ kvarkaneŭtronikaj steloj formiĝas kiel restaĵoj de la eksplodo supernova. En la ambaŭ manieroj de la nukleosintezo, kiel bazo estas la unuiĝo de la nukleoj de hidrogeno en heliumo kaj de heliumo kun aliaj elementoj, por formi ĉiujn aliajn elementojn. La standarda teorio esploras la transformiĝon de la materio ene de la limoj de la transformado de la

ligoj atomo-molekuleca, dum la superdensan formon de la materio oni estas lasinta en silento, kvazaŭ en “tomboejo de la steloj” mortinta post la eksplodo, kiu formas la eventon supernova. Tiamaniere oni neglektas la aktivigon de la formo superdensa en la kosma transformiĝo de la materio. Konsiderindas, ĉu la kosma eksplodo estas la elpafo, kiu disdonas kaj ekbruligas la superdensan materion ene de la gaso-pulvoraj nuboj. Ĉi tiu ekbruligo estas la kaŭzo de la nukleosintezo. Tiel kompreniĝas la kosma transformiĝo de la materio tra tri formoj: La superdensa formo kiel en la stelo kvarkneŭtronikaj, la ordinara formo atomo-molekuleca kaj la trorarigita formo de la fizikaj kampoj kaj radiado. Krom la nukleosintezo de la atomaj nukleoj, estas ankaŭ nukleosintezo senpera, per kiu komenciĝas la nukleosintezo de la stelidoj kaj de la eble estontaj planedoj ene de gaso-pulvora nubo.

La gasformado estas akompananta fenomeno de la rokoformiĝo, sekve tiu procezo generanta la rokon kaj la gasojn en la kosmo. La sama generas ankaŭ en la nukleo de la Tero. Konsiderinda kvanto de la heliumo en la konsisto de la natura gaso (iafoje ĝis 7%), la ĉeesto de tiu gaso en la vulkanaj rokoj kaj en la bazaltoj de la ofiolitaj zonoj kaj la tre alta konsisto de la kvociento $^3\text{He}/^4\text{He}$ en kelkaj “varmegaj makuloj” ligitaj kun la trombaj formoj, grim pantaj supren ekde la kontakto nukleo–mantelo, estas nediskutebla fakto pri la interna generiĝo ne nur de la heliumo sed ankaŭ de la hidrokarbuoj. Des pli akcentendas ke la kvociento de la izotopoj de la heliumo tri kun la heliumo kvar $^3\text{He}/^4\text{He}$ estas proksima al tiu de la suna vento.

4.3 La tertremo kaj la tektonika misformado

Inter la vulkanoj kaj tertremoj ekzistas funkcia, spaca rilato, kiu spontane evidentiĝas pro ties komuna disvastiĝo, ĉefe laŭlonge de la moveblaj zonoj de la globo kaj laŭlonge de la randoj de la tektonikaj grundbuloj (tutmondaj platoj) kaj profundaj fendoj.


La laŭgrada evoluo de la sisma frapo, la tertremo, prezentiĝas sur bildo 3. Ĝus la prismagnetika materio ree eliĝinta el la nukleo fariĝas materio je magmaj karakterizaĵoj, ĝi komencas ŝoviĝi je la direkto de la eksteraj randoj de la internaj geosferoj, kie ĝi fluas rojen laŭradiuse kaj laŭlatere, poste malmoliĝas laŭskale en diversaj niveloj.

Kiam la akumuligo de ĉi tiu materio en la litosfero atingas kritikan staton kaj kaŭzas la rompiĝon de la gravita sfero de la Tero tra ĝibiĝoj, la leĝo de la sfera gravita ekvilibro kontraŭagas por restarigi la misformitan gravitan ekvilibron, kaŭzante aŭ malrapidajn tektonikajn movojn aŭ tujajn, la tertremojn.

La agado de la nukleo kaj la evento de la tertremo rompas en la epicentra areo la magnetikan kampon kaj reagis al la sunaj cikloj pro la sola kialo, ke en la nukleo kaj en la suno okazas similaj procezoj aŭ la samaj procezoj.

Eblas, ke la respektivaj pozicioj de la suno kaj de la luno [18, 19] akceli la eventon de la tertremo, kiu estas jam pretigita laŭgrade pro la internaj kialoj de la Tero.


Enaj geodinamikaj fenomenoj



Bildo 3: Skiza modelo de la pligrandiĝo de la oceana krusto kaj geologiaj procezoj; elmontriĝas la rompiĝo kaj restariĝo de la gravita ekvilibro kaŭzanta la tertremon aŭ la malrapidan tektonikan translokiĝon pro la alportoj de la magma maso tra difinitaj vojoj kaj trombaj formoj. Pro tiu ĉi rompiĝo de la ekvilibro estiĝas premantaj fortoj kaj tektonika moviĝo supertranslokiga. Do dum la Tero kreskas, ĝi kreas ankaŭ la diagonalajn translokiĝojn kun horizontala komponanto de la faltiĝintaj areoj

5 El la Nukleo al la kompleta tero

La argumentado de la transformiĝo de la superdensa materio en la fokuso de la nukleo kiel procezoj de nukleosintezo, konformas al la konkludoj en la fiziko de la kampo kaj partikloj [24, 12, 23], samkiel en la astrofiziko [1, 2]. Samtiel ĝi konformas al la matematikaj kakulaĵoj de la mekaniko de la spaco por la transformado de la gaso-pulvora nuboj en la sunsistemo kaj kompletigas la konsiston de ĉi tiu nuboj en la beba fazo de la formiĝo, je la ĉeesto de la superdensaj globetoj je origino pro la kosma eksplodo, nomata kiel evento supernova. Ĉi tiu interpretaĵo konformas al la konkludo akirita en la astronomio ke la bebaj nuboj de la steloj formiĝantaj kiel parto de la granda ciklo en la medio de la engalaktika spaco, kiel gaso-pulvora materialo cirkulas el la nuboj en la stelojn kaj denove inverse kaj, ke la komencanta fazo de la ĵusformita stelo apenaŭ povas observiĝi, pro fakto ke ĝi estas kaŝita en la netravedeblaj areoj de la gaso-pulvora nuboj. Tamen, la lastaj observoj estas montrintaj la ĉeeston de transruĝa fonto en la netravedebla centro de la nuboj, kiu povas interpretiĝi kiel ia protosuno je la komencanta fazo, kaŭzanta gravitan falon [47]. Ĉi tiu observo altrudas radikalan ŝanĝiĝon en la kompreno de la interrilato nuboj-stelo. La interpretaĵo de ĉi tiu observo, devigas nin halti kaj esplori ĉi tiun fonton de energio sekve de la transformiĝo de la materio ene de la nuboj. El ĉi tie, oni povas konkludi ke la faktoro kaŭzanta la gravitan falon (kollapso) de la planedformiga nuboj devas esti spontana de la nuboj propre, konforme al



Bildo 4: Idealigita skizo de la kresko de la Tera globo ambaŭflanken: deesktere kaj deinterne, de la superdensa geosfera kerno (4) transformebla kaj lokita super la intera areo (3) je direkto al la interna nukleo (1 kaj 2). La formiĝo de la novaj magmaj zonoj en la mezoceana kresto, de la vulkanaj rokoj en la "varmegaj makuloj" kaj en la surfaco de la trombaj strukturoj korespondas je tempo al la formiĝo de la supra areo intera D" (6) de la ekstera nukleo (5) al la mantelo kaj eksteren. La sinsekvaj bazaltaj zonoj kiuj konstruas progresive la oceanan fundon (14) ekde la kresto (6) ĝis la kontinentoj (13) kronologie estas ekvivalentaj al la sinsekvaj geosferoj de la mantelo (7, 8, 9, 10, 11) ĝis la krusto (12). La kresko ene de la tromaldika geosfera kerno de la superdensa transformebla materio estiĝas pasante la ree formita substanco tra la malsupra intera areo (3) al la interna nukleo (2) ĝis la interna nukleo de la interna nukleo (1) (la aŭtoro)

mia konkludo pri la ĉeesto de la superdensaj pecetoj en la gaso-pulvora nuboj, post la evento supernova.

Tiel post iu eksplodo je tipo supernova, la gaso-pulvora nuboj kun luparo de superdensaj globetoj kaj trohejtigita plasma krono, estas jam firmigita en la sunsistemo. En ĉi tiu procezo formiĝis ankaŭ la Tera nukleo kiu vestiĝis per silikata envolvado, generita pro la transformiĝo de la kerno de la nukleo kaj pro la altiro de la nubaj materialoj.

6 Konkludoj

- Preter la kresko de la oceana plando, la tuta Tero kreskas en du direktoj, eksteren kaj internen de la argumentita kerno de la nukleo, lokigita kiel superdensa diafragmo inter la ambaŭ nukleoj.
- La meĥanismo de la kerno de la nukleo formas novajn konceptojn je scienca vereco pri la dinamismo kaj evoluo de la Tero ekde la origino tra la transformado kaj kosma cirkulado de la materio laŭ la linio: superdensa formo- atomo- molekuleca- fizika kampo- radiado kaj inverse kc.
- La Tera nukleo kun sia kerno estis la embriona Tero kiu laŭgrade estas vestita per silikata envolvado kaj restis suno je miniaturo, dum la suno estas centra nukleo trogranda de la sunsistemo, nekapabla por blokiĝi pro sia propra produkto aŭ pro la altirita materio.

Pri la aŭtoro

Prof. Vedat Shehu devenas el la Malnova Borsh (Saranda), estas diplomiĝinta kiel geologia inĝeniero (en la eksa ĉeĥoslovakio 1959), estas dekorita per tri Labor Ordenoj kaj unu Respublika Premio, estas laborinta pri la utilaj mineraloj kaj pri la inĝenieria geologio, aparte pri la akvopovostacioj, tuneloj, pontoj ktp.; estas partopreninta en la scienca agado: en la kompilado de la geologia mapo de Albanio (1983). Lian plej altan sciencan integrecon ni trovas ĉe lia teorio la Krekanta kaj Evoluanta Tero pro la Transformado de la Nuklea Kerno, publikigita en la albana (1988, 2009) kaj en la angla (USA 2005), prezentita en la artikoloj publikigitaj kaj referitaj en la konferencoj kaj konsultoj.

Bibliografio

- [1] S. F. Anderson k.a. "Mapping Low-Density Intergalactic Gas: A Third Helium Ly α Forest". En: *Astronomical Journal* 117.1 (1999), p. 56. DOI: [10.1086/300698](https://doi.org/10.1086/300698).
- [2] C. Barceló k.a. "Black Stars, Not Holes". En: *Scientific American* 301.4 (2009), 38–45. DOI: [10.1038/scientificamerican1009-38](https://doi.org/10.1038/scientificamerican1009-38).

- [3] V. V. Belousov. "Plate Tectonics – Assessments and Reassessments". En: Eld. de C. F. Kahle. Am. Assoc. Petroleum Geologists Mem. 23, Tulsa, 1974. Ĉap. Sea-floor spreading and geologic reality, 155–166.
- [4] S. M. Berhe. "Ophiolites in Northeast and East Africa: implications for Proterozoic crustal growth". En: *J. Geol. Soc.* 147.1 (1990), 41–57. DOI: [10.1144/gsjgs.147.1.0041](https://doi.org/10.1144/gsjgs.147.1.0041).
- [5] V. F. Blinov. "On the hypothesis of Earth's expansion". En: *Fizika Zemli* 1 (1973), 27–35.
- [6] S.W. Carey. *The expanding Earth*. Developments in geotectonics. Elsevier Scientific Pub. Co., 1976.
- [7] S.W. Carey. *Theories of the Earth and Universe: A History of Dogma in the Earth Sciences*. Stanford University Press, 1988.
- [8] D. R. Choi. "Global seismic synchronicity". En: *NCGT Newsletter* 55 (2010), 66–73.
- [9] D. R. Choi. "Haiti seismic disaster viewed from the perspective of the energy transmigration concept and block tectonics". En: *NCGT Newsletter* 54 (2010), 36–44.
- [10] D. R. Choi kaj L. Maslo. "Earthquakes and solar activity cycles". En: *NCGT Newsletter* 57 (2011), 80–97.
- [11] Y. V. Chudinov. "Expansion of the Earth as alternative to the New Global Tectonics". En: *Geotectonics* 10 (1977), 240–251.
- [12] F. Close. *Particle Physics: A Very Short Introduction*. Very Short Introductions. OUP Oxford, 2004. ISBN: 9780192804341.
- [13] Y. Dilek, M. Shallo kaj H. Furnes. "Rift-drift, seafloor spreading, and subduction zone tectonics of Albanian ophiolites". En: *Inst. Geol. Rev.* 47.2 (2005), 147–176. DOI: [10.2747/0020-6814.47.2.147](https://doi.org/10.2747/0020-6814.47.2.147).
- [14] R. M. Edwards. "Gravity, Cosmology and Expanding Earth". En: *Earth Expansion Evidence*. Eld. de G. Scalera. ARACNE editrice S.r.l., 2011, p. 197–212.
- [15] V. T. Forlov kaj T. I. Forlova. *The Origin of the Pacific Ocean*. MAKS Press, 2011.
- [16] H. H. Hess. "History of ocean basins". En: *Petrological studies: A Volume in Honour of A.F. Buddington*. Eld. de A.E.J Engel, H. L. James kaj B. F. Leonard. Geol. Soc. Ame., 1966, 599–620.
- [17] O. C. Hilgenberg. "Formation and development: contraction or expansion". En: *Why expanding Earth?: a book in honour of Ott Christoph Hilgenberg*. INGV Publisher, 2003.
- [18] M. Kokus. "Alternative theories of gravitation and geology in earthquake prediction". En: *NCGT. International Geological Congress* 32. Aŭg. 2004.
- [19] V. V. Kolvankar, S. More kaj N. Thakur. "Earth Tides and Earthquakes". En: *NCGT Newsletter* 57 (2011), 54–84.

- [20] X. Le Pichon. "Sea-floor spreading and continental drift". En: *J. Geophys. Res.* 73.12 (1968), 3661–3697. DOI: [10.1029/JB073i012p03661](https://doi.org/10.1029/JB073i012p03661).
- [21] F. J. Low kaj K. S. Krishna Swamy. "Narrow-band Infrared Photometry of α Ori". En: *Nature* 227 (1970), 1333–1334. DOI: [10.1038/2271333a0](https://doi.org/10.1038/2271333a0).
- [22] J. Maxlow. *Terra Non Firma Earth*. Oneoff Publishing.com, 2005.
- [23] R. Meidani. *Mbi Strukturën e Materjes në Fizikë*. Tiranë: 8 Nëntori, 1982.
- [24] D. Merja. *Udhëtim në mikrobotë*. Tiranë, 8 Nëntori, 1981.
- [25] A. A Meyerhoff kaj H. A. Meyerhoff. *Plate Tectonics – Assessments and Reassessments*. Eld. de C. F. Kahle. Am. Assoc. Petroleum Geologists Mem. 23, Tulsa, 1978. Çap. Seafloor spreading and geologic reality, 43–154.
- [26] W. J. Morgan. "Rises, trenches, great faults, and crustal blocks". En: *J. Geophys. Res.* 73.6 (1968), 1959–1982. DOI: [10.1029/JB073i006p01959](https://doi.org/10.1029/JB073i006p01959).
- [27] L.S. Myers. "Accretion of the Earth and Solar System – How planets are created, Grow and Expand to become Suns." En: *Earth Expansion Evidence*. Eld. de G. Scalera. ARACNE editrice S.r.l., 2011, p. 233–238.
- [28] V. V. Orlenok. *Global volcanism and oceanization of the Earth and planets*. I. Kant State University of Russia Press.
- [29] V. V. Orlenok. *History of the Earth Oceanization*. Jantamy skaz., 1998.
- [30] H. Owen. "The Earth Is Expanding and We Don't Know Why". En: *New Scientist* 22 (2003), 27–29.
- [31] B. Romanowicz kaj Y. Gung. "Superplumes from the Core-Mantle Boundary to the Lithosphere: Implications for Heat Flux". En: *Science* 296.5567 (2002), 513–516. DOI: [10.1126/science.1069404](https://doi.org/10.1126/science.1069404).
- [32] G. Scalera. "The expanding Earth: a sound idea for the new millennium". En: *Why expanding Earth? A book in honour of O.C. Hilgenberg*. Eld. de K. H. Scalera G. kaj Jacob. INGV Publisher, 2003, 181–132. URL: <http://hdl.handle.net/2122/1152>.
- [33] G. Scalera. "The Mediterranean as a slowly Nascent Ocean". En: *Ann. Geophys. Supp* 49.1 (2006), 451–482.
- [34] G. Scalera, E. Boschi kaj S. Cwojdzinski. "The Earth Expansion Evidence – A Challenge for Geology, Geophysics, Astronomy and General Knowledge". En: *Earth Expansion Evidence*. Eld. de G. Scalera. ARACNE editrice S.r.l., 2011, 3–11.
- [35] M. Shallo kaj Y. Dilek. "Development of the ideas on the origin of Albanian ophiolites". En: *Geol. Soc. Ame.* 373 (2003), 351–363. DOI: [10.1130/0-8137-2373-6.351](https://doi.org/10.1130/0-8137-2373-6.351).
- [36] M. Shallo k.a. "Magmatismi ofiolitile i shqiperise". En: *Ist. SP. Geol.* (1985).
- [37] V. Shehu. "Earth Expansion Through Activity of the Earth Core-Kernel as Active Cosmic Object". En: *Earth Expansion Evidence*. Eld. de G. Scalera. ARACNE editrice S.r.l., 2011, p. 243–262.

- [38] V. Shehu. "The Earth a Sample of Universe in our Hands, According to the Earth Expansion Through the Developing Earth". En: *NCGT. International Geological Congress 32*. Aŭg. 2004.
- [39] V. Shehu. *The Growing and Developing Earth*. BookSuege, 2005.
- [40] W. B. Shen, W. Chen kaj Zh. G. Zhang. "The expanding Earth: evidences from temporary gravity fields and space-geodetic data". En: *Geophys. Res. Abs.* 10 (2008).
- [41] A. G. Smith. "Tethyan ophiolite emplacement, Africa to Europe motions, and Atlantic spreading". En: *Geol. Soc. London* 260.1 (2006), 11–34. DOI: [10.1144/GSL.SP.2006.260.01.02](https://doi.org/10.1144/GSL.SP.2006.260.01.02).
- [42] K. M. Storetvedt. "Falling Plate Tectonics – Rising New Paradigm: Salient Historical Facts and the Current Situation". En: *NCGT Newsletter* 55 (2010), 4–34.
- [43] M. I. Sumita I. kaj Bergman. "Inner core dynamics". En: *Treatise on Geophysics* 1 (2007). Eld. de G. Schubert, 299–318.
- [44] K. Vogel. "Contributions to the Question of Earth Expansion Based on Globe-Models". En: *Earth Expansion Evidence*. Eld. de G. Scalera. ARACNE editrice S.r.l., 2011, 161–172.
- [45] A. Wegner. *Die Entstehung der Kontinente und Ozeane*. Vieweg, 1929.
- [46] K. M. Yano k.a. "Continental rocks in Indian Ocean". En: *NCGT Newsletter* 58 (2011), 9–28.
- [47] C. J. Young kaj T. Lay. "The Core-Mantle Boundary". En: *Annual Review of Earth and Planetary Sciences* 15.1 (1987), 25–46. DOI: [10.1146/annurev.ea.15.050187.000325](https://doi.org/10.1146/annurev.ea.15.050187.000325).